



## MUZEO DE LA MARO

Viale Colombo, 92  
"Havena Areo" (Zona Porto)  
63074 San Benedetto del Tronto  
Tel. +39 735 592177  
E-mail: musei@comunesbt.it

Muzeo Antiquarium Truentinum

Muzeo de la Amforoj

Fiŝmuzeo "Augusto Capriotti" \*

Muzeo pri la Mara Civilizo de Markio \*

### Vintra horaro:

Vendrede, sabate kaj dimanĉe: 10-13 h, 15,30-18,30 h; en aliaj tagoj laŭpete, por grupvizitoj.

Lunde fermita.

### Somera horaro:

15/06-15/09, ĉiuj tagoj, 18-24 h.

Lunde fermita.

\* Interne la Fiŝmuzeo estas la Kultur-Sciencasocio Fiŝmuzeo "Capriotti" - Tel. kaj fakso 0735 588850.

\* En la Muzeo pri la Mara Civilizo de Markio estas haveblaj gvidiloj en la itala kaj angla lingvoj.

INFO +39 735 794588/596 - cultura@comunesbt.it - musei@comunesbt.it

www.comunesbt.it - www.museodelleanfore.it - www.museoitticocapriotti.com

Pro helpo kaj kunlaboro, la organizantoj de la 66-a Internacia Kongreso de la Esperantistaj Fervojistoj estas dankaj al:

Regiono *Marche*

Provinco *Ascoli Piceno*

Komunumo *San Benedetto del Tronto*

Muzeoj *San Benedetto del Tronto*

Historia Arkivo *San Benedetto del Tronto*

Komerca Konfederacio (*Confcommercio*) *San Benedetto del Tronto*


Hotelo *Calabresi San Benedetto del Tronto*

Centro I.A.T. *San Benedetto del Tronto*

DLF (Postlabora Fervoja Organizo) *San Benedetto del Tronto*



# havena vidaĵo



La origina projekto de la Fiŝmerkato

Gvidlibreto pri la "Muzeo de la Maro"



Ĉi tiu eldono, kiu celas proponi sintezan "rigardon" kaj samtempe kompletan pri kvar el la kvin sekcioj (unu, la Pinakoteko de la Maro, lokiĝas en Palaco Piacentini) de la " Mara Muzeo" de *San Benedetto del Tronto*, aperas samtempe kun la malfermo de la lasta el ili, la *Antiquarium Truentinum*: valora kolekto kiu formiĝis danke al la pasia laboro efektivigita de la membroj de la loka sekcio de la Italia Arkeoklubo, kies prezidantoj estis la karmemoraj Novemi Traini, unue, kaj poste Nazzareno Spinozzi.

Tiel kompletiĝas projekto komencita pli ol 50 jarojn antaŭe kun la naskiĝo de la Fiŝmuzeo nomata laŭ Augusto Capriotti, eminenta sciencisto, kiu mortis antaŭtempe, kaj estrata kun nekredibla pasio de Albano Bugari, al kiu ni sendas nian ameman rememoron.

La projekto disevoluis per la establiĝo, en la tuto de la Fiŝmerkato taŭge restaŭrita, de la Muzeo pri amforoj, senpreza heredaĵo al la urbo de d-ro Giovanni Perotti, urbestro, kuracisto kaj persono, kiu dum jardekoj aktive partoprenis en la urba vivo. Eĉ al lia memoro la urba administracio plenkore omaĝas.

Male, nur antaŭ ne longe okazis la naskiĝo de la tria sekcio de la muzeo, dediĉita al la mar- karia mara kulturo, kiu intencas proponi al la vizitanto, uzante ne nur dokumentojn, trovaĵojn kaj aĵojn pri la labora vivo, sed ankaŭ lastgeneraciajn plurmediajn aparatojn, por doni la ŝancon akiri ideon kiel ŝanĝiĝis tra la jarcentoj la vivo de tiuj, kiuj vivas ĉe la maro kaj per la maro. Pri la peza tasko de tiuj, kiuj luktas ĉiutage kontraŭ la kaptiloj de la maraj insidoj, oni montras esencajn kaj viglajn impresajn atestojn per iloj, dokumentoj, atestoj kaj rakontoj de granda sensacio.

La Antiquarium, kiel dirite, atingas la kulminon de ambicia revo, kiu iĝis realaĵo: trovi kolektitaj en granda ekspozicia ejo la plej signifajn pecojn de mozaiko kapablajn prezenti al la vizitanto la spektaklon de la mara vivo. Tuta mondo, kiu, malgraŭ la evoluado de la teknikoj por kaptado, daŭre baziĝas sur rektaj rilatoj inter homo kaj maro, ofte karakterizitaj de heroeco, de dramo, ĉiam de laciĝo.

*La Skabeno pri Kulturo*  
Margherita Sorge

*La Urbestro*  
Giovanni Gaspari

Tiu ĉi kajereto, eldonita okaze de la 66-a Kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio), organizita de IFEA (Itala Fervojista Esperanto-Asocio), estis adaptita el samnoma eldono de la Historia Urba Arkivo, zorge de Giuseppe Merlini, kun testoj de Franco Civardi, Giuseppe Merlini, Mara Maritello, Stefano Novelli, Benedetta Trevisani, Gino Troli, Gaia Pignocchi; la slogano "*Unu maro por vivi, unu muzeo por revivi*" estas de la 2-a C Mezlernejo "Sacconi"; grafikajoj de Giovanni Ciarrocchi kaj de Studejo "Progetto Zenone"; Eldonejo Tipografia Fast Edit, Septembro 2012.

Tradukis kaj editoris ĝin, proprainiciate, ame kaj danke pro la kortuŝa gastameco de la Urbo San Benedetto, Romano Bolognesi, Honora Prezidanto de IFEF, kiu kore gratulas al la aŭtoro kun la kunagantoj kaj dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis por la bona sukceso de tiu ĉi iniciativo kaj kunlaboris en la tuta manifestacio.

Bologna, Majo 2014.



## Lu porte

Lu porte va dendre a lu mare e da lu mare se péje i udóre, i remóre, e anghes i culóre quan- l'acque e lu cîle se mète d'accorde pe' èsse tutt'óne. La pózze de pèsce frante e de nafte che vè só da i mutóre a caccóne j fa storce lu nase, ma, quanne tó passe vicéne a 'na barche e l'annàse, jè còme s'a tètè de dicèsse: "Ecche qua, jé ci aje a che fa nghe lu mare, sò sporche de sale e de pèsce, sò tótta mbracchiate de ónte, ma la pózze che sinte jè fatte de fatéje e sedóre."

A lu marenare che sbarche nghe i cutórne 'mmellate de mare l'udóre de barche j remane só i pagne e 'ppiccate a la pelle che jè ngótte de sóle. Revà llà ccase e se rlave, ma la pózze sòtta sòtte remmane perchè lu porte n'atra vòte lu chame e la barche l'aspète pe' rengumingià la fatéje. Dendre a lu porte jè sempre bunazze. La barche ch'à tante penate llà fòre, sburdienne mmènze a tótte le botte de mare, revè 'n terre nghe lu tante u lu puche pescate. Vòle a frotte loc'andórne i cucale e gradidèje cerchène lu magnà tra i scarte remmaste 'n cuvèrte u vetate llà mmare. J vaste nu cappie de sciaule a la barche p'attaccasse a 'na bitte, e nghe i parabbórde de 'òme se strósce a lu porte. I marenare sbarche lu pèsce che jè bill'e 'ssettate 'n cascète e va a fené sòpra i carretócce pe' èsse vennóte. A borde ci remmane nu ca' sóle a fà la 'uardie, e.. la barche se pò repesà. Só la banghine mò sinte le vòdce de le pesciaróle mischiat'anzime a chèlle de i marenare. E da i cantíre vicéne vè póre i remóre de i mart'je che sbatte, de le sèghe, de la fiamm'ussitriche che spóte lóccere e fuche só i fianche de le barche fantèlle che lu mare nne l'àngò cunuscíote. Quanne cale la notte só lu porte, la véte se fèrme ma nen s'addorme lu mare. E le barche se mète a parlà. De dé nen le pu senté pe' tótte i remóre llà 'ntórne, ma de notte, se lu mare nen rebbòle e sta zéte, tó sinte suspére e laminte

de le barche nnazzeate dall'acque che j fa fà ndandaló. Pò èsse che sogne caccuse, ma capace che póre raccònte la véte de mare, i viage ch'à fatte, le nembicciate 'mprevése e la bunazze morte senza nu fiate de vinte, le cuse bòne e catteve che siccede pe' mare. Ci sta dendre a lu porte barche cióche che nen s'allentane mai da la coste, ma ci sta póre chèlle de ferre pesante che te mète suggezziò. Nen jè fatte pe' stu mare nustre, che jè mmeccò rrefelóse ma ci à le coste vicéne e nghe lu timpe cattéve te pò dà nu riccítte. La barca grosse, mmice, se ne va spèrse pe' i mare lentane. Passe i dé, passe i mèsce senza vedè atre che nóvele 'n cîle e se scorde la terre. Quanne dève da parté, 'ppécce i mutóre e se scoste accec'acceche da lu vracce de porte, coma fusce nu gigande ggentéle che nen vò fa male a nisciò. Se 'ncamméne lèmmè lèmmè per rrescé llà de fore, ppu mète i mutóre a tótta forza e s'allentane sempre ppió, s'allentane fenacchè la véde cióca cióche che svanésce tra lu mare e lu cîle. Ma la casa ssune jè lu porte. Daje timpe mpù de mèsce che recumparesce lentane coma 'na macchia scóre sussòpre a lu mare. Mmeccò dope la véde cióche che pare 'na barche nannète, ma ppu s'avvicéne e devente sembre ppió grosse e ppió àte. Rrentre stracche, 'mmaccate, mmeccò sculurete e nghe i fianche scrustate dentre le vracce aperte che l'aspète. Se véde ch'à patete la luntananze e lu mare, ma èsse póre jè cuntente come i marenare che sbarche redènne e scherzènne perchè qua 'nterre la véte jè leggere senza tante fatéje e penz're.

Lu viage à fenete e mò la barche se pò repesà fianc'a fianche a lu porte. Preme de repar- tètè n'atra vòte pe' nu mare lentane. Cacche barche, mperò, nn'à mai revenóte. A ssa perse pe' mare nghe j ummene e tótte, e lu porte pò póre 'spettà.

Benedetta Trevisani

# havena vidaĵo




## La Pogranda Fišmerkato


*La "Muzeo de la maro" - vaste dislokata en la tuta Pogranda Fišmerkato ĉe la Norda Kajo en la havenurbo - estas muzeo, kiun la Komunumo de San Benedetto del Tronto dediĉis al la maro. Ĝi inkluzivas la Antiquarium Truentinum, la Muzeo pri Amforoj, la Muzeo pri Fiŝoj "Augusto Capriotti," la Muzeo pri la Mara Civilizacio de Markio kaj ankaŭ la Pinakoteko de la Maro kvankam troviĝanta en la "Palaco Piacentini" en la "Alta Vilaĝo" de la urbo.*

La "vasta kaj impona Pogranda Fišmerkato" en *San Benedetto del Tronto* (komence konstruita sur areo 81,10 x 76,20 m), kiel difinita en la momento de ĝia konstruado, oficiale ekfunkciis en 1935, anstataŭante la malnovan Fiŝvendejon, kiu staris apude. En la tridekaj jaroj de la XX jc. San Benedetto akiris la superecon en tuta Italio kaj en Mediteraneo pro surterigitaj, aŭkciitaj kaj surmerkatiĝitaj fiŝokaptaĵoj. La jara kvanto estis ĉirkaŭ 70 mil tunoj kaj la tuto de la nova merkato devis nepre adaptiĝi al tiu rekordo. Konceptita racie de ing. Luigi Onorati, tuj ĝi estis konsiderata plejnova kompare al aliaj merkatoj en Italio, kun centra konstruaĵo por la Ĝeneralaj Servoj, flankigita per du strukturoj en formo de "L" por magazenoj, kun markozoj laŭ la frontoj, granda centra ŝedo el fero (41 x 43 m, kun maksimuma alto 12,60 m), parte kun vitraĵoj kaj parte kovrita, por la


aŭkciroj de la produkto, apartigita de la menciitaj konstruaĵoj per strato larĝa 10 m-ojn kaj duobla akvujo por sensala kaj mara akvoj, kiel rezervoj por la akvosistemoj.














MAPO DE LA UNUA ETAĜO

-  ekstera muzea itinero
-  muzeo "el la vero": la Haveno





La aŭkciejo

El la priskribo de la projekto: (...) la konstruaĵo konsistas el tri domoj: la centra kun du etaĝoj kaj la flankaj kun nur unu.

La centra grandas 32 x 13,35. En la teretaĝo troviĝas, unuflanke la oficejoj de la merkatabanko, aliflanke la estrejo kaj la loĝejo de la gardisto.

Centre troviĝas: la vestiblo, la ŝtuparo al la supra etaĝo, la telefonoficejo kaj salono por marĉandado kaj notado.

Supre estas la loĝejo por la Direktoro.

La du flankaj konstruaĵoj (ambaŭ 21,50 x 76,20 m) entenas 24 fiŝmagazenojn, du ĉambrojn por la kestfabrikado, du ĉambrojn por la fridujoj kaj por la glacia kelo, necesejojn, lavejojn kaj urinejojn, ĉambrosalonojn por la pumpiloj.

En la subtegmento de ĉiu magazeno estas salono por stokado de kestoj (...).

La markezo laŭ la du konstruaĵoj larĝas 6 m kaj altas 4,50 m. (...)

La plankoj de la magazenoj, markezoj kaj centra ŝero estas grejsfajencitaj. Tiu de la o-

ficejoj estas el cementa marmorpasto.

La multaj lavkuvojn estas el blanka cementa marmorpasto.

La feraĵoj estas farbitaj aluminiie. La magazenoj, farbitaj blue, havas cementajn plankoplintojn; la necesejoj estas tegitaj per blankaj emajlitaj kaheloj, la muroj sub la markezoj, pli multe en kontakto kun la akvo uzata por lavi la fiŝojn estas tegitaj per bluaj emajlitaj kaheloj (...).

La diversaj instalaĵoj, teknike kaj racie organizitaj kun akvoprovizado per tre evoluinta sistemo, estis la unua ekzemplo, en Italio de produkta Merkato.

Per kvar elektraj pumpiloj, konektitaj por funkcii aŭtomate laŭnecese, la sensala akvo kaj la mara estis elpumpitaj kaj enmetitaj en la grandan basenon el betono 20 m alta, kun granda kapablo: 42 m<sup>3</sup> da freŝa akvo kaj 33 m<sup>3</sup> da mara akvo.

De la akvujo la marakvo alvenis al la kuvojn por lavi la fiŝojn (unu po ĉiu magazeno), la sensala akvo alvenis al la basenojn por lavi la

de la ensabligo, kiu tro ofte igas neuzebla parton de la haveno. Sekve de la ĉi supraj konsideroj, oni alvenis al la konstruo de plilongigo de la norda moleo, laboro kiu daŭris ĝis 1932, sed precipe en la jaroj 1935 ĝis 1937 per la konstruo de 642 m de la suda moleo.

### La Milita kaj la Postmilita periodoj

La milito, inter 1940 kaj 1945, skribigas al la haveno kaj al la tuta maristaro de San Benedetto unu el la plej malbonaj paĝoj de ĝia historio.

Multaj fiŝkaptaj ŝipoj estis rekvizitaj kaj uzataj por kvazaŭmilitistaj celoj; la fiŝkaptado estas preskaŭ komplete nuligita kaj la havena strukturo devis suferi damaĝon pro neglekto kaj manko de vivtenado, kiu kaŭzas laŭgradan ensabligon, sed ĉefe ĝi estis celo de pluraj bombadoj, kiuj multe damaĝis ĝin, kaj ĝi iĝis preskaŭ neuzebla.

Al tiuj aldoniĝis la decidaj sabotadaj agoj de de retiriĝanta germana armeo. La postmilita jardeko prezentiĝis kiel periodo de intensa laboro por la ŝiparo kaj por la tuta urbo San Benedetto, ĉar oni devis rekonsistigi la floton, kiu estis preskaŭ tute detruita, sed antaŭ ĉio oni devas ŝtopi la truojn sur la du moleoj, rekonstrui la kajojn, kiuj estis forte damaĝitaj kaj preskaŭ neuzebla, forporti la ŝiprompaĵojn el la haveninterno, readapti kaj ripari ĉiujn konstruaĵojn, kiuj devas gastigi la helpajn necesajn servojn por la marista laboro kaj fine plani kaj realigi novajn vorkojn de ampleksigo kaj plibonigo de la haveno.

### 60-aj jaroj

Alia periodo de aparta graveco estas la jaroj '60, kiam ekestas nova variaĵo de la floto, kiu, kvankam eltenas la teknikajn karakterizaĵojn de loka fiŝkaptado, per aliaj ŝipoj teknike pli evoluigitaj, ekspansias al la t.n. "mediteranea fiŝkaptado" kaj sekve al la "oceana".

Ŝanĝiĝis boatoj, sistemoj kaj lokoj de fiŝkaptado kaj estis ankaŭ forta kresko de la komerca agado, kiu en tiu jardeko, atingis la plej altajn nivelojn de kresko kaj produktiveco.

La haveno devis adaptiĝi, la akva sufaco ne plu sufiĉis por gastigi ĉiujn navigilojn, sed ankaŭ la kompletigaj infrastrukturoj kaj servoj de tiu areo devis esti komplete ĝisdatigitaj.

En la periodo 1962-63 estas realigataj la ŝipkonstrua deklivaĵo kaj plilongigo de la sama suda moleo.

La 30-an de Marto 1968 al la Publikkonstrua Oficejo pri maraj aferoj de Ancona oni prezentis proponon por ĝisdatigi la Urban Regulligan Planon por la ekspansio de la haveno de San Benedetto, kiu antaŭvidis la kreon de tria brako norde de la ekzistanta.

### XXI jarcento

Eĉ la lastaj tri jardekoj karakteriziĝis per readaptigaj kaj plibonigaj laboroj de la havenaj instalaĵoj.

Eĉ la lastaj tri jardekoj karakteriziĝis per readaptigaj kaj plibonigaj laboroj de la havenaj instalaĵoj.

Inter la multnombraj intervenoj dum tiuj jaroj estas utile rememori la ĉefajn, kiu estas: la laŭgrada realigo kaj etendo de la kajoj laŭ la interna havena perimetro, laboroj necesaj unue por redukti kaj forigi ĉiujn sablajn zonojn, ankoraŭ ĉeestantajn dum la '70-aj jaroj, kaj ne uzeble albordiĝeblajn kaj danĝerajn por la ŝipoj; la konstruo de la nova havenadministristrejo, la restrukturado de la fiŝvendejo, kaj de la nova aŭkciejo de la fiŝoj; la preparado de la nova turismaj doko; la raciigo de la provizadaj punktoj (fuelo kaj akvo); fine urbaj aranĝoj (monumentoj, lumigado ktp) kiuj, kvankam ne ĉiam strikte en rilato al la havenaj agadoj, helpis kontribui igi ĉi tiun areon atingebla kaj interesa el la turisma vidpunkto.



Tiu situacio daŭris ĝis kiam oni sukcesis, ĉirkaŭ la fruaj jaroj de la XX jc., konstrui du malgrandajn brakojn (t.e. Norda kaj Suda Moleoj) perpendikularaj al la marbordo.

### 10-aj jaroj

La longa planada proceduro por la konstruo de la haveno de San Benedetto dezirata de la Komunuma Administracio kaj apogata de la parlamentano Luigi Dari, Subsekretario por Publikaj Laboroj kaj elektita ĝuste en la loka balotdistrikto, fine sukcesis en julio 1908, per la subskribo de kontrakto inter la komu-

numa aŭtoritato kaj la konstruonta firmao de la unua brako de la norda moleo.

En 1912, kompletiĝis la konstruo de la unua sekcio de la norda moleo, kiu estos plilongigita - per plua laboro, kiu finiĝos en 1918 - per la atingo de la tuta longo je 230 m.

En 1919 komenciĝis la laboroj por la konstruo de la unua sekcio de la suda moleo, donante al la koncerna areo de la plaĝo la unuan aspekton de la haveno strukturita per du klifantenoj - perpendikularaj al la marbordo.

### 30-aj jaroj

Alia mejloŝtono en la konstruo de la haveno de San Benedetto del Tronto estas reprezentita de la 30-aj jaroj.

La jardeko inter 1930kaj 1939 vidas la disvastiĝon kaj relativan sukceson de motorŝipoj kompare al velŝipoj, jam nun, destinitaj okupi fiŝkaptan niĉon; tiu variado estis la kerno de la evoluo de la havena strukturo, kiu postulis pli kaj pli spegulon de trankvila akvo, pli profundan fundon kaj uzeblajn dokojn por ligi boatojn kaj surterigi la fiŝojn.

Oni devis ankaŭ alfronti la konstantan problemon

ilojn (ĉiam po unu en la magazeno) kaj al la diversaj hidrantoj, lokitaj ĉe la plej taŭgaj punktoj por lavi la placojn, stratojn, vendejojn, ktp.

La postrestanta akvo estis kolektita de kloakreto kaj elverŝiĝis en la maron ekster la havena areo.

La teruraj bombadoj kaj mitraladoj dum la Dua Monda Milito, kiu kaŭzis la morton de pluraj civiluloj, havis negativajn efikojn sur la tuta komplekso de la Pogranda Fiŝmerkato. Post la milito tuj rekomenciĝis la sanbenedikta fiŝkaptado kaj komercado, kaj sekve estis necese rapide rekonstrui kiel eble plej baldaŭ ankaŭ la Fiŝmerkaton.

En 1997, la Pogranda Fiŝmerkato en San Benedetto estis pligrandigita.

En tiu periodo naskiĝis la ideo, ke la strukturo - jam gastiganta la Fiŝmuzeon "Augusto Capriotti" - povus gastigi ankaŭ aliajn fakojn de multe pli granda poluso en rilato al la maro, nediskutebla ĉefrolanto de al urba historio.

Hodiaŭ, la komplekso estas ankaŭ la hejmo de komercejoj, malsamaj produktadaj aktivecoj kaj kulturaj asocioj.



Eniro de la fiŝkaptadoj

*"En San Benedetto la maristo ne kolektas la diversajn proponojn sed krias laŭte la prezon, kiun li volas ricevi por ĉiu funto de sia kaptado, per monotona kantileno kaj laŭgrade li ĝin malaltigas ĝis aĉetanto antaŭeniĝas.*

*La prezojn, kiujn krias la aŭkciisto kaj kutime ĉiujn kalkulojn inter la maristoj oni esprimas laŭ "essudo" kaj "paŭloj": kurioza postlasaĵo de la malnova papa monsisistemo.*

*Dum en la esplanado la aŭkcioj sin sekvas ĝisnokte, ĉirkaŭe, ĉe la ekspedistoj, la deĵorantaj laboristoj rapide aranĝas la fiŝojn en la kestojn, kiuj estas poste transportitaj al la stacidomo, kie ili likgutas en atendo de la trajnoj, kiuj transportos ilin al la regionaj urboj, al Abrucioj, al Romo kaj al aliaj urboj de Italio."* (Secreti, Ĝermano. Le vie d'Italia, Touring Klub Italiano, 1926).

En 1935 la servo estis organizita en jena maniero: la fiŝoj, ĵus elŝipigitaj, estis transportitaj sur reletoj sub la centra ŝedo.


Okazis la aŭkcio, la produkto estis zorge kondukata de la aĉetantoj en la magazenojn kaj sub la markezo, kie estis lavita, preparita kaj enkestigita.

La fiŝoj tiam estis transportitaj, ekster la merkato, uzante la vojon konstruita inter la magazenoj kaj la centra markezo, kaj direktante ilin al la konsumcentroj.

## Genezo de la Fiŝmerkato

De la frua XVIII jc. kaj longe post la komenco de la XIX. Estas informoj pri fiŝmerkataj aktivecoj organizitaj en diversstipaj manieroj. Krom la kolportistaj vendistoj, kiuj iris al Umbrio kaj Latio, koncerne al fiksjaj lokoj oni scias pri la ĉeesto de kabanjoj apud la marbordo, kie, ene aŭ ĉe ilia sojlo okazis komercaj intertraktadoj.

1867. La Urbo San Benedetto planas la kon-



struon de fiŝvendejo sed komplikaj burokrataj proceduroj malhelpas ĝian tujan aplikon.

**1873.** La urbaj Fiŝejo kaj Buĉejo, kiuj de la kvardekaj jaroj de la XIX jc. estis en la sama konstruaĵo, ene de la urba domaro, apartiĝas kaj sur ilia tereno oni konstruas Kazernon.

**1886.** Estas konstruita sur la strando granda fiŝmerkato kaj kune publikiĝas la unuaj proceduraj reguloj.

**1919.** La Urbo aprobas la aplikon de la akcizoj je freŝa fiŝo.

**Fruaj jaroj tridek.** Pro la transakcioj, kiuj okazas ene de la Fiŝejo kaj la kvanton de surtergigitaj fiŝoj, San Benedetto ekakiras nacian rekordon.

**1932.** Dum nacia propaganda kunveno por fiŝkaptado, lokiĝas la unua ŝtono de la Nova Pogranda Fiŝmerkato desegnita de inĝ. Luigi Onorati.

**1934.** Aprobiĝas la Regularo de la Nova Fiŝmerkato.

**1935.12.07.** Inaŭguro de la Pogranda Fiŝmerkato, ĉe la radiko de la Norda Kajo, kun "Banka Merkato," Direktorejo kaj Sanitara servo; oni forlasas la malnovan fiŝejon.

**1935.** Konstruiĝas ankaŭ Podetala Fiŝmerkato (nun sur Placeto Andrea Pazienza) ĉe Strato Giardini (nun Strato Mazzocchi) kaj estas aprobita la koncerna Regularo.

**1936.** La Reglamento de la Pogranda Fiŝmerkato estas modifata kaj renovigata denove en kelkaj artikoloj la postan jaron.

**1943-44.** La Pogranda Fiŝmerkato fermiĝas pro manko de aktiveco, kiel rezulto de la milito.

**1948.** Oni rekonstruas, per brikoj, la centran

ŝedon kaj oni plenumas aliajn renovigojn de la Pogranda Fiŝmerkato bombita dum la Dua Mondmilito.

**1956.** Danke al iuj entuziasmaj sportaj fiŝkaptistoj, kiuj hazarde ĉeestis dum varma diskuto pri la ĝusta nomo de fiŝekzemplero, naskiĝas la ideo de kolektado kaj konservado en kemiaj solvaĵoj de la plej komunaj specioj



Post la rekonstruo

de fiŝoj, kiuj pasas tra la loka merkato, kun apudskribo montranta la sciencajn kaj la diversajn dialektajn nomojn. La 25-an de Marto naskiĝas la Fiŝmuzeo.

**1964.** La Fiŝmerkato inaŭguras la unuan aŭtomatan aŭkcion.

**1976.** Post pluraj lokŝanĝoj la Fiŝmuzeo translokiĝas en la unuan etaĝon de la centra konstruaĵo de la Fiŝmerkato, kie ĝi restis ĝis 2001.

**1988.** D-ro Giovanni Perotti donas al la urbo tre valoran elekton de amforoj el sia kolektaĵoj.

**1992.12.** Ekfunkcias nova elektronika aŭkcio nomata "nederlanda".

**1996.** Oni ricevas la lastan EU-aprobon por la aŭkcia halo.

**1997.** La Pogranda Fiŝmerkato renoviĝas kaj pligrandiĝas.

tojn al Kabo Bon, al la bluaj orienta plataĵoj, al la atlantikaj akvoj de la ekvatoro, tiujn de la Ruĝa Maro kaj de la malvarmaj maroj de la Nordo, ebligas bone kompreni la epopeon de la oceana fiŝkaptado.

Post la sukcesa sperto de la ŝipo Sapri de la fratoj Merlini antaŭ la Dua Mondmilito, kaj post la unuaj pioniraj kampanjoj de fiŝkaptado en la Mediteraneo, en 1956 komenciĝis la granda atlantika aventuro.

La unua ŝipo trapasinta la Kolonojn de Herkulo por atingi novajn fiŝejojn estis la Nicola Marchegiani, kiu estis sekvata, kun ĉiam pli streĉa kaj kontinua ritmo, aktivaj iniciatoj de aliaj lokaj ŝipentreprenitoj.

Post la fiŝkaptadoj en la Atlantiko, dum kiuj la ŝipanoj de pluraj malsamaj flotoj estis bazitaj ĉe la insulo Las Palmas en la Kanariaj Insuloj, estis la vico de la Hinda Oceano kaj fine ankaŭ de la Pacifiko, antaŭ la marbordo de Peruo.

Eble periodo de mallonga daŭro sed certe rimarkinda kaj edifa trafo en la soci-kultura kaj ekonomia evoluo de la

sanbenediktana maristaro kaj, nerekte, de la tuta urbo.

Fakte, tiu estis por San Benedetto periodo de ekonomia eksplodo kaj de ŝanĝoj; danke al la konsiderindaj mensendoj de la oceanaj fiŝkaptistoj, la urbo disvastiĝis rapide, ekstaris tute novaj kvartaloj, ĝis, kaj trans, la teritoriaj limoj kaj disvastigata ekonomia prospero investis, diversgrade, ĉiujn civitanajn tavolojn.



### La evoluado de la fiŝkaptado

La longa vojo, kiu kondukas al la plena ekonomia sukceso de la fiŝkaptado estas karakterizita per periodoj tre bone difinitaj, tiel ke ili povas esti resumita kiel sekvas:

- La periodo de la integriĝo de la agrikulturo per fiŝkaptado (ŝiabicado);
- La periodo de la tartano kiel boato Adriatika;
- La periodo de la uzo de du ŝipoj (trolŝipoj);
- La granda epopeo inter la XIX kaj XX jc. de fiŝkaptado per trolveloj;
- La alveno de la motoro kaj la mekanika fiŝkaptado;
- La epopea aventuro fiŝkapti en Atlantiko;
- La nuna ekologia krizo de la Adriatiko.

### Muzeo "el la vero": la Haveno

Tiu de San Benedetto del Tronto estas la plej suda haveno de Markio kaj konsistas el la Norda tutkaja Moleo, kaj el la suda Moleo.

La haveno estas la hejmo de granda fiŝfloton kaj ĝi estas en la dua vico por graveco en Markio. La fiŝkapta sistemo estas ĉefe trena, sed efektiviĝas ankaŭ la rikoltado de moluskoj per manaj dragaparatoj kaj ankaŭ "malgrandskala" fiŝkaptado.

La manko de haveno dum pluraj jarcentoj implikis la alterigo sur la malferma strando, kun enormaj elspezoj de energio kaj tempo por la lanĉo en la akvon kaj la denova surterigo de la barkoj.





ŝipojn kaj, poste, konstrui kaj lanĉi tutnovajn fiŝkaptajn ŝipojn.


Nova profesieco estis postulata kaj tiel multaj filoj de maristoj devis spertiĝi kaj sukcese regi novan motorizatan metion.

## Marista migrado el San Benedetto

La grandaj kaj aŭdacaj sanbenediktaj motoraj flotoj, kies rapidaj boatoj plugis la raŭ-

### LA MARISTA ELMIGRADO EL SAN BENEDETTO

- Ekde 1820 kas ĝis la 2-a duono de la XIX jc. al Giulianova, Silvi, Castellammare Adriatico (Pescara), Ortona, S. Vito Chietino.
- De 1845 al Anzio, Civitavecchia.
- Ekde 1870 al Ĝenovo kaj La Spezia.
- De 1890 kaj ĝis la 1-a duono de '900 al Portovenere, Le Grazie, Lerici, Bocca di Magra, Ameglia.
- De la fruaj jaroj de '900 al Viareggio (kun daŭra migrada fluo dum la tuta XX jc.), kie instalĝis ankaŭ iuj familiaj grupoj el San Benedetto jam loĝantaj en la urbetoj de la Golfo de La Spezia.
- De 1918 al Abbazia (Opatia) kaj poste al la Insulo Lussino.
- De 1930 al San Vito Chietino, Vasto, Termoli kun pluraj familiaj loĝantaj en tiuj urbetoj dum mallongaj fiŝperiodoj aŭ aliaj familiaj kun definitiva resideja lokŝanĝo.
- De 1930 al Cesenatico kaj al aliaj lokoj de la romanja bordo.
- De 1930 al Zara (Zadar) kaj Spalato (Split).
- De 1950 el Viareggio al Porto Torres.
- De 1960 el Viareggio al Castiglione della Pescaia.



#### ELMIGRADO TRA LA MONDO:

Fine '800 - unua duono '900 al Chicago Heights (Illinois) kaj de tie multaj familioj elmigris al Collinsville (ĉe la estuaro de la rivero Sacramento), S. Francisco kaj S. Diego (Kalifornio). De la fruaj jaroj '900 al Buenos Aires kaj ĉefe al Mar del Plata (Argentino). De 1910 al Callao (Peruo). De 1950 al Perth (Aŭstralio).



2002. Inaŭguro de nova sistemo de elektronika aŭkcioj.

2003.12.06. Estas malfermata, en la nuna sidejo, la Muzeo pri Amforoj.

2011.02.06. Inaŭguro de la Civilizacia Muzeo de la Markioj.

2012.09.29. Post taŭgaj preparado kaj renovigado, malfermiĝas la Muzeo Antiquarium Truentinum.



Hakiloj el bronzo - Kolekto Guidi

### Antiquarium Truentinum

La vizita itinero komenciĝas per la arkeologia mapo de la teritorio de San Benedetto, kie estas notitaj la lokoj de la malkovroj de la eksponaĵoj kaj la gravaj konstruaĵoj ankoraŭ videblaj.

La eksponaĵoj estis trovitaj en areo inter la riveroj Tesino norde kaj Tronto sude, partoj de la teritorioj de Monteprandone, Acquaviva kaj Ripatransone okcidente kaj la Adriatika Maro oriente kaj ili parte rezultiĝas el jardekoj de surfaca kolekta laboro fare de la loka Arkeoklubo kaj parte el stratigrafiaj elfosadoj efektivitaj de la Arkeologia Markia Intendantejo.

La ekspozicio malfermiĝas per ŝtonaj iloj, silikaj objektoj ellaboritaj de homoj kaj ceramikaj fragmentoj datiĝantaj el neolitika epoko kaj ĉefe venantaj el la areo de Porto d'Ascoli.

Temas pri malgrandaj splitoj, sagpintoj, ĉiziloj, iloj uzataj en la ĉiutaga vivo de la prahistoria homo por senfeliĝi, manĝi, labori, ĉasadi.

Pri la Frua Bronza Epoko oni notigas la ĉeeston en la ekspozicio de la "Kolekto Guidi", temas pri bronzaĵoj trovitaj en la frua XX jc. ĉe Acquaviva en la bienoj de la markizo Antonio Guidi, Urbestro de San Benedetto dum la jaroj 1911-1919.

Sekvas, pri la Bronzepoko meza kaj fina, ceramikaj fragmentoj trovitaj inter Monte Renzo kaj Fosso dei Galli. La postaj vitrinaj montras la artfaritaĵojn el la Fera Epoko, periodo kiam la teritorio estis loĝata de la Picenoj. Piceni, Picenti, peuketies, pikenoi estis la nomoj per kiuj grekoj kaj romianoj mal-specife nomis la italajn popolojn de la meza Adriatiko.

Tie elmontriĝas materialoj venantaj de la teritorio, inkluzive de funebra tomba kompleto trovita en San Francesco di Monteprandone. La vizito daŭras per sekcio kie la loka romia historio interplektiĝas kun la historio de la urbo Truentum, sub kies jurisdikcion sendube ĝi falis dum la romia periodo.



Steleo Marcilius



Sarkofago



Truentum, fondita de la *Liburnoj*, estis ĉe la buŝo de la rivero Tronto fine de la antikva *Via Salaria*, kuniganta la Tirenan Maron al la Adriatiko tra la apeninaj valoj. La epigrafiak atestoj trovitaj en la *agro truentino* venas plejparte el la nordo de la rivero Tronto. Inter tiuj, la steleo de *Marcilius*, datita I jc. a.K., kiu parolas pri truentinano, kies metio estis *porporario*, t.e. teksaĵtinkturisto.

La ekspozicio daŭras en malgranda ĉambro, kie staras granda fragmento de togata statuo, trovita en 1833 en la kvartalo *Bore Ragnola Monteprandone*, flankita de du urnoj, fragmento de epigrafo surskribita *OMNE SOLV* (versajne vota) kaj la ŝtona sarkofago el *San Donato Monteprandone*.



Grandvalora estas la impona arkitravo kun dorika friso de la funebra monumento trovita ĉe *San Donato Monteprandone*, eble atribuebla al loka elstarulo de la malfrua respubliko kaj de la frua imperio.

Laŭlonge de la okcidenta muro de la halo montriĝas partoj de romiaj kolonoj el la *Salita al Monte* en Porto d'Ascoli, arkitekturaj elementoj kaj antikvaj malfruaj trovaĵoj (inter kiuj kapitelo kun ununura krono el folioj), fragmento de multstila kapitelvoluto kun glataj folioj el *San Donato Monteprandone*. Kaj ankoraŭ fragmento de ionika kapitelvoluto el *Fosso Sgariglia* en Grottammare rilatanta al kovrilo de porcindra paralelepipedo kaj parto de sepulteca bareliefo trovita en Strato Moncalieri en Porto d'Ascoli kun virkapo enkadrita per arkoforma branĉo de folioj kaj fruktoj.

En la lasta ĉambro, krom grandega ŝtonsarkofago kaj granda ĵaro (*dolium*) trovita en Strato 2 Giugno en Porto d'Ascoli, oni rakontas pri la elfosaĵoj en la Alta Vilaĝo, kiuj malkovris partojn de romia domo.

Lastatempaj laboroj (2009-2012) malkovris la romiajn radikojn de la urbo.

Temas pri biendomo kun majestaj loĝĉambroj najbare de utilecaj laborejoj, kiuj kune



Tino (*dolium*) el romia epoko

En la sama salono, du grandaj tendoj reproduktas alian funebran steleon, dediĉita al truentinano *Buxurius* (nun elmontrita en la Urba Muzeo de *Ripatransone*) kaj la funebran urnon, dediĉita al la eta Teopompo kaj ekspoziciita en la Muzeo de Ascoli.

En la apuda ĉambro du vitrinaj gardas la amforajn relikvojn, elfositaj ĉe *Monte Renzo* kaj *Monteprandone*, la "*istrumenta domesticum*"-n de Strato Lauri en San Benedetto, nigre pentritajn kaj sigelitajn fragmentojn de ceramiko el *Fosso Sgariglia*, lime inter San Benedetto kaj *Grottammare*, kaj ĉiujn ekspoziciaĵojn, ĉiuj el la teritorio, kiuj montras la klasojn de la romia ceramikaĵoj.

## MI, Adriatika Maro

Oriento kaj Okcidento: la du marbordoj kompare.

Adriatico, en la itala.

Deti Adriatik, en la albana.

Jadransko more, en la bosnia, la kroata kaj la montenegra.

Jadransko morje, en la slovena.

Adriatiko: mara markolo ĉirkaŭ 800 km longa kaj 150 km averaĝe larĝa, preskaŭ enlanda maro, artikulacio de la Mediteranea Maro, fermita inter du grandaj duoninsuloj: la balkana kaj la itala.

La surfaca areo de 132 mil km<sup>2</sup>, limas sude kun la markolo de Otranto, la areo en kiu interŝanĝoj okazas kun la akvo de la interkontinenta maro.

La limigita amplekso de la tajdoj ebligis eke de la antikvaj tempoj la fondon de grandaj loĝataj centroj ĉe la marbordo.



## El trolŝipo al la motoro

1765 kaj 1912 estas du tre gravaj jaroj por la mara historio de la picena marbordo. Je la unua dato okazis la enkonduko de la *paranca* (fiŝkaptista ŝipara sistemo), dum 1912 estis la jaro en kiu sanbenedektanoj, kiel unuaj enkondukis, kun respekto al la tuta duoninsulo, - kiel helpilon por velnavigi - la eksplodmotoron sur barko "*portapesce*" (fiŝtransporta).

Ĝia iniciatinto, la sanbenediktana parokestro Francesco Sciocchetti, kiu en la lokoj de sia loĝejo ĉe la preĝejo "Nia Sinjorino de la Maro" enkondukis eksplodmotoron por instrui la filojn de la maristoj, akiris, krom nacian konatecon, la oran medalon de la Ministerio pri Publika Vorkoj.

Dume kooperativaj ekagis kaj organikaj leĝojn pri fiŝkaptado aŭ pri maristoj aprobiĝis.

Poste sekvis jaroj karakterizitaj per studoj kaj eksperimentoj, kiuj kondukis la sanbenediktanojn adapti, unue, motorojn sur malnovajn fiŝkaptajn





"**Vòta cì**" estas la leksika simbolo de mondo, kiu malaperis el antropologia vidpunkto, tiel kiel soci-ekonomia.

"Vòta" signifis "turnu" kaj "cì" staris por "knabo".

Admono, komando, esprimita pli aŭ malpli aŭtoritate de la ŝnuristo al junulo deĵoranta ĉe la rado, kiu sinteze entenas la koncizan historion de la lingvo kaj de la metio de la ŝnuristoj.



## La settemane de lu fenare

di Ernesto Spina

### lunedì

E vinne cj!... su vinne cucche bjlle  
Che mo te compre 'n solde de casciole.  
Mm' à da ggerà la rote 'm quartarille  
Vaste che file na fezzole sole!  
Se pu te stj 'nghe mme na settemane  
La paghe, sa, 'ntelluteme te dinghi  
E so secure che nghe mme remmane  
Perché pe 'n fa lagnà, prassà ce tinghe!!

### martedì

E tu pare cent'anne che fatije!  
Scj bbrave, svilte e pu fatijcatore!!  
De razzte, ce se sa che sse repije!!!  
Dematine sa cu' vinne a bbun'ore!

### mercoledì

E manche scj minute che ggià magne?  
E mittete a vetà!... porca culonne!!  
Vu porbie che biastime, che mme 'mgagne?...  
Mannagge a chi sta bbe, su 'n quiste monne!!!

### giovedì

Vote! E sciuje! Le ma tte sa 'ncieppete?  
E mammete tt'ha fatte de pelente!...  
Ggire!... ggire!... che fa?... te sc' 'mpetite?  
Scj pardete 'n persone, bbune a gnente!!

### venerdì

Sotte capite! Ggià te sci stefate!...  
J te lu 'mpare a cammenà diritte,  
Te dinghe su la cocce 'na stangate!...  
Ne mme rememmjà e statte zitte.

### sabato

Nghe lu cùle penenzù te scj 'rrezzate?  
Jè ggià de mantemà che cirche rogne!!  
Va vj!... revanne!... va 'murrj 'mmazzate!...  
E nen te retrescià brutta carogne!!!

### domenica

Jè 'nfame, ll'ome, e porbie mmalamente!  
Mmà fatte fatejà 'na settemane,  
Mo mm' à scacciate, senza damme gnente!...  
Sa quante è mije nasce 'na lemane!...

## La semajno de la ŝnuristo

de Ernesto Spina

### lundo

Venu knabo!... Venu trezoreto  
Nun mi aĉetos por vi groŝon da boligigitaj kaŝtanoj.  
Per la rado vi devas al mi ŝpini kvaronhoron  
Sufiĉas la laboro nur por unu kanabfasko!  
Kaj se poste vi restos kun mi unu semajnon  
La pagon, vi scias, je la fino mi donos al vi  
Kaj mi certas, ke vi restos kun mi  
Ĉar mi multe zorgas por ke ne estu plendoj!

### martedì

Kaj ŝajnas, ke vi laboris jam cent jarojn!  
Vi estas lerta, rapida kaj laborema!  
Oni scias, ka ĉio devenas el la raso!  
Morgaŭ matene, memoru bebo, venu frue!

### merkredo

Vi ĵus alvenis kaj ĉu vi jam manĝas?  
Ekturru la radon!... kolumno putina!  
Ĉu vere vi volas, ke mi blasfemu, ke mi ekkoleru? ...  
Honton sur tiuj, kiuj prosperas en ĉi tiu mondo!

### ĵaŭdo

Turnu! Kaj malplektu! Ĉu viaj manoj frostiĝis?  
Kaj ĉu via patrino vin faris el polento?  
Ŝpinu!... Turnu! Ĉu vi ... reĝis kiel infano?  
Vi estas kiel via patro en persono, sentaŭgulo!

### vendredo

Mi elkonis vin! Vi jam laciĝis!...  
Mi instruas al vi marŝi rekten,  
Mi donos al vi baton sur la kapon!...  
Ne grumblu kaj silentu.

### sabato

Kun alta la postaĵo ĉu vi ellitiĝis?  
Jam de la frua mateno vi serĉis disputpretekston!  
Iru for! ... eliru! ... iru morti murdita!...  
Kaj eĉ ne turnu vin, vi vera aĉulo!

### dimanĉo

Tiu viro estas fia, kaj tre malbona!  
Li laborigis min unu semajnon,  
Ĵus li min forpelis, doninte al mi nenion!  
Ja vi scias, kiel estus pli bone naskiĝi animalo!...

konsistigas preskaŭ la duonon de la areo okupita de la fortikaĵo ĝis 1600.

La elfosaĵoj malkaŝis nur malgrandan parton de la vilao, sed diversaj studoj dum la XIX jc. kaj komparoj permesas identigi laŭlonge de Strato Rossini restaĵojn de kelkaj hejmoj kun mozaikoj kaj pentritaj muroj (I jc. a.K. - I p.K.), ĝis ebla peristilo, la kolonita malfermita korto meze de la domo, la mastra domo. Dum la imperia malfrua periodo (III jc. p.K.), la domo estis adaptita al produktiva strukturo. La ĉeesto de baseno laŭ formo de "L", identigita kiel *fullonica* pro amasoj de *murex* (la konkoj, el kiu oni eltiris la purpuran kolornuancon), sugestas ĝuste pri laborejo por tinkturi ŝtofojn, kiel tiu *Marcilius*, la truentana *purpurarius* de la enirejo. Vitroŝranko montras la materialojn de la elfosaĵoj. Oni daŭrigas kun la malfrua antikva kaj mezepoka historio de San Benedetto kiam ekde la IV jc. en la "Alta Vilaĝo", ekstarigas la paroŝa ĉefpreĝejo San Benedetto, nomita, laŭ la loka tradicio, al la martiro Benedetto, juna romia oficiro el *Cupra* akuzita esti kristano, ekzekutita inter 284 kaj 305.

Tradicio diras ke li estis senkapigita sur la ponto de de torento *Menocchia* kaj poste ĵetita malsupren en la akvon, kies fluo forportis lin al la maro ĝis krando piede de la monto, sur kiu estis konstruita la nuna urbo.



Paleokristana surskrivo

Kampanano prenis la restaĵojn de la martiro kaj kunportis ilin sur la monteton, kie, kune kun la aliaj loĝantoj, li enterigis ilin.

Apoge al la tradicio de San Benedetto estas parto de frua kristana surskrivo, datita 376 p.K., ankoraŭ videbla hodiaŭ en la Preĝejo de San Benedetto la Martiro, sur kiu, laŭ iuj fakuloj, oni aludas al *Frukta*, la fratino de la sanktulo.

El 1146 datiĝas la akto pri la fortikaĵo de San Benedetto, kiam *Berardo* kaj *Atto*, filoj de *Gualtiero*, ricevis de *Liberto*, episkopo de *Fermo*, la sufiĉan terenon por konstrui kastelon.

Malfruaj antikvaj kaj mezepokaj atestoj estis trovitaj dum elfosaĵoj en la "Alta Vilaĝo."

Ĉe Strato Rossini la eltrovo de granda nombro de grenaj kavoj aŭ truoj en la tero uzataj por konservado de nutraĵoj, ebligas supozoj, ke en la mezepoko, la areo inter la Malnova Pordo ĝis Placo Sacconi, estis uzata por stokado kaj konservado de nutraĵoj.

En sekva periodo la kavoj eble perdis utilon kaj uziĝis kiel "rubujoj"; en ili estis multnombraj potfragmentoj kaj granda kvanto de ostraj konkoj, kiel atesto pri la manĝkutimoj en urbo, en kiu jam, ekde la antikvaj tempoj, ekzistis marista tradicio.

Ankaŭ en Strato Rossini, proksime de la preĝejo dediĉita al San Benedetto la Martiro, ekde la angulo kun Strato Muto, estis elfositaj ĉirkaŭ 30 simplaj tomboj, atribueblaj al la tombejo de la kanonikoj ĉirkaŭ la jaro 1600.

Fina panelo klarigas la arkitekturan evoluon de la historia centro de San Benedetto "alta" ĝis la XV jc.

## Muzeo de la Amforoj

La specialaĵo de tiu ĉi Muzeo estas la kunigo de ujoj, laŭ malsamaj tipologioj kaj historioj, ĉiuj reakiritaj tra tuta Mediteraneo per la retoj de la fiŝa ŝiparo de San Benedetto, kiu dum la XX jc. praktikis trenkaptadon en malsamaj marareoj, de la Egea al la Ionia, de la Tirrena al Sicilia kaj, kompreneble, en

la Adriatiko. Tiuj amforoj iĝis parto de kolekto de D-ro Giovanni Perotti, kiu en 1988 donacis ĝin al la Urbo, kaj kiuj alvenis al ni por rakonti la eksterordinaran historion de la Mediteraneo kaj ĝia antikva civilizacio.

Tiu tre interesa kolekto estas unika en Italio ĉar ĝi kummetas submarajn trovitaĵojn de malsamaj aĝoj kaj kulturoj (amforoj kanaana, fenicaj, punikaj, grekaj, romiaj, bizancaj, ktp).

La instalaĵoj de la Muzeo da la Amforoj estis desegnita por akordigi intencojn sciencajn kaj popularigajn.

La diversaj etapoj kaj la informa ekspozicio (komercoj, produktoj, amforoj, subakvaj esploradoj, ŝipaj arkitekturoj) estas ilustritaj per edukaj paneloj kun priskribo en klara kaj simpla lingvo kaj per sintezaj subtekstoj ĉe la eksponaĵoj.



### Salono 1: Maro da amforoj

La ekspozicio komenciĝas per du amforoj kun granda historia valoro, unu *kanaana*, la plej malnova transporta ujo, kaj la dua *punika* produktita en Kartago. Sur la ligna planko, centre de la salono, kiu desegnas la Mediteranean Maron, oni povas virtuale laŭiri la itineron, la limŝtonojn de la komercaj vojoj de la amforoj retrovitaj en la profundaĵoj. Oni renkontas iujn el la plej komunaj romiaj amforoj, ĉefe uzataj por la transportado de vino, komencante per tiuj de la respublika epoko, kiel la *greka-itala*, produktita en diversaj mediteraneaj areoj inter la III kaj la II jc. a.K., la *Marseillaise 5*, fabrikita en la greka kolonio de *Massalia* (Marsejlo), la *Dressel 1*, la amforo plej disvastigata en la okcidenta Mediteraneo, kaj la *Lamboglia 2*, la plej utiligata en la Adriatiko. La amforoj de la imperia epoko informas nin pri novaj produktoj kaj pliaj komercaj vojoj: la *Dressel 43*, devenanta de la Egeo, la *Dressel 6A*, la plej populara kruĉo en la Adriatika Maro en la I jc. p.K., la *Dressel 38-39*, amforo de la suda Hispanio por transporti *garum*, fiŝa saŭco aparte populara sur la tabloj de la romianoj, du amforoj el la provincoj de Norda Afriko, kiuj (III - V jc. p.K.), kiuj ludis gravan rolon en la provizado de oleo, la *Afrika II* kaj la *Keay XXV*.



**Amforo Kanaana**  
Produktado: *Marborda Regiono inter Palestino kaj Sirio (nun Libano)*. Trovloko: *Libana marbordo (1928)*.  
Distribuido: *orienta Mediteraneo (Palestino, Sirio, Egiptio, Grekio)*.  
Dato: *XV - XII jc. a.K.*  
Enhavo: *vino, mielo, oleo kaj incenso*.



**Amforo punika**  
Produktado: *Kartago kaj la marbordoj de Afriko (nun Tunizio)*.  
Trovloko: *sude de Sirakuso (1938)*.  
Distribuido: *okcidenta Mediteraneo*.  
Dato: *IV - III jc. a.K.*  
Enhavo: *vino, olivoj, fiŝa saŭco*.

al la laboro de la fiŝkaptistaj fratoj, estos fonto de fiero por la juna virino, de respekto far la parencoj de la edzo kaj de envio de ŝiaj amikinoj.

Kaj la ŝia estas centra rolo, kun forta konotacio, en matriarka socio, pro la kontinuaj forestoj de la viroj engaĝitaj en la marlaboro. Ŝia virineco estas fortika, hardita pro la dommastrinaj laboregoj aldone al la ŝarĝoj de elementa entreprenemo kiel retfaristino, fiŝvendistino, lavistino, teksistino, brodaĵistino.

La patrineco, ofte vivita sen la viro por kunpartigi la ĉiutagan familiajn rilatojn, profundigas la interligon kun la infanoj, kiuj, en la patrina ĉeesto, trovas ankron kontraŭ la fluktuo de la patra figuro.

La oftaj vidvinecoj, pro maraj katastrofoj, nigre vestigas la funebrantajn virinojn, sed tio ne limigas ilian reagantan forton, vivtenata pro la neceso daŭre esti la familia defendo.

La apartaj trajtoj de la vivo en mara medio favorigas malferman kaj viglan sociemon.

Ĝi povas esti kunlabora aŭ konflikta, sed ĉiam dinamika interrilato ene de tiu populara mikrokosmo, en kiuj la virino estas la ĉefrolulo kun siaj energiaj gestoj, foje malglataj, kaj kun la tipa sona voĉeco, kiuj fakte estas pruvitaj per multe da dialekta poezio kaj en bildoj.

Krom la domekonomio kaj la infanedukado, la sanbenedektana virino estis ŝarĝata per tuta serio de aktivecoj rilatantaj al fiŝkaptado, kiel produktado de retoj, teksado kaj posta fabrikado de veloj kaj de vestoj por la familio. Iuj eĉ uzis retojn kune kun la viroj aŭ turnis la kapstanon; post la atendo de sia edzo dum horoj sur la strando, ŝi malŝarĝis la kaptaĵon kaj vendis la propran parton aŭ adjudikis ĝin al vendisto.

Simile, la figuro de la infano prenis sur sin malsaman rolon kompare al tiu, kiun oni kutimas vidi en moderna socio: de la plej fruaj jaroj la lerneja praktiko estis anstataŭita per tre fruan lernadon por la akiro de bazaj konoj

por navigado kaj la enŝipiĝo jam okazis ĉirkaŭ ses jaroj, kun infanoj destinataj iĝi plenkreskaj antaŭ la tempo.

En la listoj de ŝiprompiĝoj kaj en tiuj de la ostaĝoj ĉe barberiaj piratoj en la XIX jc. multaj ŝipanoj estis infanoj aŭ adoleskuloj.

## Kanablaboristoj kaj ŝnuristoj

Profesia kategorio, kiun oni devas meti sur la saman historian nivelon, kiun oni rezervas al la fiŝistoj, estas tiu de Kanabistoj, veraj punlaboristoj.

Ili havis la taskon prepari tunojn da kanabo por la fabrikado de ŝnuretoj kaj ŝnuroj. Multnombraj "kombantoj" devis unue rompi kanabon, ĝenerale el *Ferrara* deveno, kaj kardi ĝin per feraj kombiloj de diversaj grandecoj. Nelacigeblaj laboristoj en fermitaj kaj malbone ventolitaj spacoj, kun inklino al haŭtmalsanoj kaj al tiuj de la spiraj aparatoj, ili devis disigi la plej bonan parton de kanabo (t.e. la floro, disde la stupo), kaj pretigi la garbojn el kruda kanabo pretaj por la ŝpinado de la ŝnurfaristoj.



La rado de la ŝnuristoj



Kiam fine la trolbarko povis navigi, la malmultajn aferojn, *lu parò* (la trolestro) povis uzi por ŝipkonduko: la perfektan konon de la ventoj, la pozicion de la steloj, la konsiston de la marfundo.

Per linia sondilo, *lu parò* povis detekti la ĝustan pozicion de la fiŝboato.

Kun ajna markondiĉo oni navigis: devus esti uragano por decidi rean alteriĝon.

Se estis Siroko, ĉiam oni fiŝkaptis norde, eĉ ĝis Rimini, kiam reblovus Mistralo, oni fiŝadis antaŭ la Abruzoj kaj komence de Apulio.

Somere, nin sekvis barketo, kiu provizis la manĝon kaj portis teren la fiŝojn, kie ni havis reprezentanton, kiu vendis ĝin."



## La marbordaj urboj de Markio: la maro kaj ŝoseo

La markia marbordo etendiĝas sur 173,37 km, inter Emilio Romanjo norde, el la buŝo de Tavollo ĉe Gabicce kaj Abruzoj sude, ĉe la buŝo de Tronto, en San Benedetto. La promontoro Konero, interrompante ĝian unuformecon, ebligas distingi du sekciojn, nordan kaj sudan, de malsama orientiĝo kaj longitudo.

La marbordo "Sottomonte" (suda), estas malalta kaj sabla, karakterizata de la t.n. maraj havenoj, malfermaj strandoj, kie, antaŭ la konstruo de basenoj aŭ protektitaj marspegu-



loj, la ŝipoj estis alportitaj al sekeco sur la bordo per la helpo de kapstanoj kaj per grandaj brakfortoj.

La vojo videbla sur malnovaj mapoj kurranta laŭlonge de la marborda linio prenis, tra la jarcentoj, malsamajn nomojn, sed la plej ofta estis *Lauretana* ĉar ĝi estis la plej rapida ligilo al la pilgrimloko Loreto, loko de religia fido en Markio, kiu de la XVI jc. sukcesis famiĝi kiel universala celo.

## La virino kaj la maro

Kiam knabino naskiĝas en mara medio ŝi jam prefiguras edziniĝontan fraŭlinon.

La dota vestaro, kiun de la naskiĝo kreskas pecon post peco por la edziniĝa okazo, danke



## Salono 2: Ĉio, aŭ preskaŭ ĉio, pri la amforoj

Ĉi tiu ĉambro enhavas la plej signifajn amforojn, kiuj estas sur du frontantaj bretoj je diversaj niveloj por pli klare komprenigi ilian kronologian sinsekvon. Oni komencas per la amforo de la helenisma periodo por transiri al la unuaj komercaj amforoj tipe romiaj, la *grekaj italaj*, ĝis la plej gravaj vinamforoj de la malfrua respublika epoko, la *Dressel 1* kaj *Lamboglia 2*, kaj de la unua imperia epoko, la *Dressel 6A* kaj la *Dressel 2/4*. Sur la alia breto la serio koncernas la amforojn de la meza kaj malfrua imperia periodo de produktado ne itala, la *Dressel 30* el Maŭritanio, la *Tripolitania I*, el la samnoma provinco, kaj la *Afrika II*, produktita en Afriko kiel la romia *Keay XXV*. En la centro de la



Dressel 30

### Dressel 30

Produktado: el la provinco *Mauretania Caesariensis* (moderna Alĝerio).

Trovloko: ĉe la marbordo de Turkio (1929).

Distribuado: laŭ la nordokcidenta marbordo de Afriko (Maroko kaj Alĝerio) kaj la Okcidenta Mediteraneo, sporade en la nordaj provincoj kaj en Romo kaj Ostio.

Dato: fino de la II - III jc. p.K. Enhavo: malcerta (oleo, vino aŭ fiŝa saŭco).



### La markoj

Temis pri realaj varmarkoj kiuj estis presitaj ĉe la bordo aŭ ĉe la anso de la amforoj antaŭ la kuirado, kiuj montras la nomon de la potista fabrikejo.

Enskribo: EX PRO MAURETAN/CAES TUB. = Ex Prov (incia)/Mauretan (ia)/Caes(ariensi) Tub(usuctu).

ĉambro, tipa amforo montras la partojn el kiuj ĝi konsistas, kaj edukaj paneloj sur la muroj montras la tipojn, trajtojn, funkciojn, malĉefajn uzojn de la amforoj, la simbolajn kontenerojn de la komerca transporto de la romia periodo.

## Tipaj elementoj

Amforo por la mara komerco kutime konsistas el diversaj partoj (rando, kolo, ansoj, korpo kaj pinto) kiuj estis faritaj aparte kaj poste kunfanditaj antaŭ kuirado.

### Rando kaj kolo

mallarĝa buŝo por eviti renversi la enhavon.

### Ansoj

fortikaj por pli facila levo.

### Korpo

kapacita por transporti plej grandan kvanton de produkto je unu tempo.

### Subpinto

finajo pedunklaforma por racia plurnivela ŝarĝordigo aŭ malhelpo kontraŭ glitado okaze de surtera apogo.



## Kio estis transportita per amforoj

La antonomaziaj manĝaĵoj transportitaj per la amforoj estis vino, olivoleo kaj fiŝa saŭco.

La amforoj por vino aŭ fiŝsaŭco estis interne tegitaj per resinaĵoj, por transdoni al la produkto apartan guston, sed oni uzis ankaŭ ujojn kun akvoeltenaj parietoj.

Anstataŭe por oleo oni uzis amforojn, en kiuj estis fanditaj fruktarbajn rezinojn (*gumma*) aŭ ujojn sen ajna traktanta proceduro, kiuj poste ne estis facile reuzeblaj.

### Vino

Vina produktado komenciĝis en la orienta Mediteraneo en la III jm. a.K. kaj poste ĝi disvastiĝis al Egiptujo kaj Grekio. En la II jm. a.K. la mara komerco estis bonfarta, precipe en la orienta Mediteraneo fare de la Kretanoj kaj Micenoj.

Por transportado oni uzis la Kanaanajn amforojn. El Grekujo, la vitarboj enkondukiĝis en Italio en la VIII jc. a.K., unue en Granda Grekio, Etruskio kaj poste ĉe aliaj italaj popoloj. En la okcidenta Mediteraneo la plej malnovaj tipoj de amforoj retrovitaj datiĝas VI jc. a.K.

La vinoj produktitaj ĉe la orienta Mediteraneo (Samos, Korinto, Rodo, Ĥios, ktp), plej ofte ruĝaj kaj nur malgrandkvante blankaj, estis maldolĉaj kaj kun alta enhavo de alkoholo je ĉirkaŭ 18 gradoj.

Por longaj distanctransportoj, la vino, ĉefe la grekaj, estis miksitaj kun marakvo por malhelpi vinagran fermentadon. En la IV - III jc. a.K. la vinproduktado estis intensigita ankaŭ en la grekaj kolonioj de la centra kaj okcidenta Mediteraneo (Granda Grekio, Sicilio, Marsejlo), aŭ en iuj areoj de intensa komerco kun Grekio (Adrio kaj Spino).

### Oleo

Ni scias, ke la oleo, kiel la vino, estis jam kultivata en la III jm a.K. en la Mezoriento, de kie ĝi disvastiĝis al Egiptujo, Kreto, Rodo kaj ĉie en la orienta mediteranea baseno. En la romiaj tempoj, la oleo estis produktata ĉefe en la adriatikaj regionoj, de Apulio al Aquilejo kaj Istrio.

Inter la II - III jc. a.K. la mediteranea regiono, kiu certigis grandan produktadon de oleo estis la Betiko en suda Hispanio. Inter la III - V jc. a.K. la provincoj de prokonsula Afriko (Bizacena) kaj Tripolitano rekorde produktis oleon ĝis la fino de la Imperio.

### Garum

La fiŝsaŭcoj, kondimentoj devenantaj de Hispanio, estis tre popularaj sur la tabloj de la antikvaj Romianoj. Tiuj saŭcoj estis akiritaj per trempado en salo de grasaj fiŝoj, kiel sardinoj, skombroj, angiloj, kun la aldono de herboj (origano, mento, romsareno). La preparado estis lasita por pli ol unu monaton en ujoj eksponitaj al la varmego de la suno. Finfine ĉio estis filtrita apartigante la likvaĵojn, la malpli valoran peklakvon, de la duonlikva produkto, kiu estis la plej bongusta parto, la delikata

garum, kiu estis aparte ŝatata kiel kondimento sur la manĝaĵoj, dum la plej solida miksaĵo estis simila al nia anĉova pasto. La grandaj eksportantoj de garum dum la romia epoko unue estis Hispanio kaj poste Maroko, kie la produktado pliiĝis precipe dum la periodo de la Severoj en la III jc. p.K.

## Ĉambro 3: Picenlando

Ĉi tiu ĉambro estas parte rezervita por komerco en antikva Picenlando. Panelo ilustras la situacion en la Adriatika Maro en la I jm. a.K. (intersanĝoj en Adriatiko, komercaj itineroj, piratado). La romia periodo estas dokumentita ne nur per la amforoj produktitaj en nia regiono, sed ankaŭ per informoj en rilato al la merkato de nutraĵoj kaj per arkeologiaj restaĵoj pri la havenoj kaj la albordiĝejoj de la suda bordo, kun aparta rilato al la fortikaĵoj konstruitaj laŭ la marbordo, el Porto San Giorgio (*Castellum Firmanorum*) al Cupra Marittima supren ĝis la buŝo de la rivero Tronto (*Castrum Truentinum*).



### Submara Arkeologio

Ne povis manki la rilatoj al la subakva arkeologio, kiel scienca esplormetodo, elfosado kaj konservado de trovitaĵoj el dronintaj ŝipoj. Multe da spaco koncernas la subakvajn trovaĵojn laŭ la marbordo de Markio, vaste dokumentitaj sur du paneloj, kie oni povas sekvi la fascinan historion de la ĉefaj malkovroj okazintaj en Meza Adriatiko, de la malkovro de la bronza statuo de greka sportisto atribuita al la skulptisto *Lysippos* ĝis la Otomana galeono, kiu dronis komence de la XIX jc. en la akvojn ĉe Pesaro.



*permesita albordiĝo*, kiu rakontas la plej dramajn epizodojn el la multaj tragedioj de la maro, La merkato, la fiŝindustrio, kun emfazo pri *la Fiŝmerkato* kiel spaco kaj loko por komerco, proponante, tamen, al la vizitanto, lerni pri la historio de la konstruaĵo en kiu la muzeo estas loĝigita, kaj *La literaturo pri la maro*.

Fine de la muzea vizitado estas videoĉambro kaj salono por prelegoj kaj libroprezentadoj kun malgranda unuo dediĉita al la *Festa della Madonna della Marina*, evidenta atesto de hodiaŭa socia partopreno de komunumo, kiu restas ligita al siaj simbolaj valoroj.

La Marmuzeo de Markio povas sciigi nin, do, en ampleksa maniero pri soci-ekonomia sekco de marborda urbeto kiel San Benedetto del Tronto, kiu ĉiam bazis sian kialon por ekzisti sur la Adriatiko.

San Benedetto longtempe tenis la rekordon kiel la plej granda fiŝhaveno en Italio laŭ ŝipnombro kaj fiŝkomerco; krom la maristaj okupoj, ĝi havas ankaŭ longan tradicion pri la fabrikado de ŝnuroj kaj fiŝretoj.

En la Muzeo estas spaco por specifa vizitunu, kiu kolektas objektojn kaj ilojn de la kanab- kaj ŝnur-laboristoj, reprezentantaj la a-

lian grandan animon de la loka maristaro, kies laboroj, kvankam aldonaj, kontribuis kaj helpis en la disvolviĝo de la urbo San Benedetto del Tronto.

## Vivo sur trolbarko. Fiŝkaptistaj navigistoj

Oni povas alfronti la maron por aventuro, por deziro koni, por bezono vojaĝi, pro militaj aŭ diplomaciaj kialoj, sed ĉefe pro kialoj de vivtenado, kiam la maro estas fonto de subteno kaj vivŝanco.

Estas tiu ĉi la maro, kiun nia rakonto priskribas, pro kiu la fiŝistoj de Markio fariĝis lertaj navigantoj, per trolbarkoj kun grandegaj veloj, kiuj unue sondis per ĝi per timemaj ŝabikoj, transiris ĝin per drivantaj tartanegoj, per sveltaj spontieroj kun grandaj retoj, elfosis ĝin per pli kaj pli hazardaj retrenadoj, ĝis la moderneco de la motoroj, kiuj danĝerigas eĉ la median ekvilibron.

La fiŝkaptala laboro estas la vera ĉefrolanto de tiu ĉi nia vojaĝo, por kiu la instigo, kiun (laŭ Plutarco) Pompeo uzis por siaj maristoj "*navigare necesse est vivere non necesse*" (navigi estas necese, ne vivi) volas esti iaspeca priskribilo pri la kuraĝo kaj pri la aŭdaco, per kiu la timo estis ekzorciata de tiuj, kiuj devis ofte fidi la maron por sia materia bezono.

Ĉi tio ne signifis ne kompreni la mardanĝerojn, male tio signifis, ke eĉ konante ilin kaj havante pri ili la taŭgajn timojn, konscii, ke la leĝoj de la vivo estis pli fortaj ol tiuj de la maro.

"Oni foriris je tagiĝo, kiam la suno ankoraŭ ne eklumis, kaj la *morè* (t.e. la plej juna) devis helpi la aliajn ŝipanojn por diversaj manovroj. *Smarrava lu ferre* ekzemple, t.e. li levis la ankron, dum la aliaj per remiloj movis for de la marbordo, dum oni levis la velantenon kaj, apenaŭ la profundo de la akvo ebligis tion, oni malsupreniris la grandan rudron.

"Luĉo Esopo pensis, ke sen arkivoj neniu povus skribi pri historio, sed li ankaŭ sciis, ke la dokumentoj, nomataj fontoj, ne por estonteca historiisto estis skribata kaj do, se ili povus esti utilaj, kaj preskaŭ ĉiam ili estis, por kalkuli homojn, posedaĵojn, ŝipojn, riĉecon, nenion ili povus diri pri la homaj estaĵoj en ilia karneco el haŭto, ostoj kaj kapo."






balkono estas ia granda klariga teksto pri la funkcia organizo de la **Haveno**, lokante en la tempo situaciojn, agojn, aĵojn de la nuntempo. En la unuo dediĉita al **Fišboato kaj fiŝkaptado** troviĝas belega modelo de "Paranza" (la boato simbolo de la muzeo), en skalo 1:10, farita de ĉarpentisto el Venecio. Sur la malantaŭa muro, post priskriboj pri la evoluado de velboato al la motoro (San Benedetto en Italio havas la distingon, ke ĝi lanĉis la kutimon uzi "motorbarkon"

de la maro ĉe la enirejo, la voĉo kaj video pri maljuna "parone" (mastro de trolŝipo) en la fako **Vojaĝoj**, malnovaj mapoj en la fako **Marlokoj**, laboriloj kaj/aŭ trovaĵoj en **Marmetioj**, en **Ŝnuroj, retoj, veloj**, kaj en la **Arto de la konstruaĵo**.

En la parto de la muzeo dediĉita al la **Maro komuna: Adriatiko**, estas la salono, kiu rigardas tra grandaj vitraj fenestroj, rekte al Adriatiko. De tie la vizitanto povas sperti la vastecon de la koncerna horizonto: la "komuna maro" en kiu la eŭroaziaz kulturaj alproksimiĝis dum la tempo. Ankaŭ la teraso, kiu rigardas la havenon estis adaptita por funkcii kiel rakonto: la

en 1912), oni traktas pri la epopea historio de la Oceana fiŝkaptado, kun ilustraĵoj pri la raŭtoj de la sanbenedikta fiŝŝiparo. Sekvas la unuoj: **La alboridiĝo**, dediĉita al la strando kaj surterigo de la kaptitaĵoj, **La mal-**



## Ĉambro 4: La ŝipo modelo

En la lasta salono, la atento tuj estas altirata de la rekonstruo, proksime en reala skalo, de la ĉarpetstrukturo de romia kargoŝipo, kiu dronis proksime de Marsejlo, kies rekonstrua projekto estas priskribita detale. La ŝipmodelo servas kiel startpunkto ne nur por illustri la teknikojn de ŝipkonstruado kaj montri hipotezon de amforkargo, sed ankaŭ por dokumenti, per detala prezentado, malsamajn tipojn de romiaj ŝipoj kaj diversajn aspektojn de antikva navigadmaniero.



## Fiŝmuzeo "Augusto Capriotti"

La besta vivo en la akvmondo estas bela kaj fascina, inda je vasta scio. Tiel ne povis manki intereso fare de iuj membroj de la amatora fiŝklubo "Giovanni Poloni", kiuj en marto 1956, entreprenis la kolektadon kaj konservadon de ĉio, kion la maro povis donaci, tiel konsistigante Fiŝmuzeon.

Nomita honore al prof. Augusto Capriotti (1920-1970), mondfama esploristo pri la mikrobiologia fako kaj iama kunlaboranto de la Nobel-premiito prof. Waksman, en 1977 ĝi estis agnoskita kaj registrita de la Komunumo. La intereso kreskis iom post iom en la loka marŝiparo, kiu post ĉiu fiŝkaptado en la "hejmaj" akvoj kaj en la oceanoj Atlantiko kaj Hind-Pacifiko, riĉigis kaj potencigis la kolekton.

Laŭ la itineroj oni povas admiri rarajn estaĵojn de fiŝoj, krustuloj, moluskoj. Same interesaj estas la fakoj pri: selakoj, cetacoj, reptilioj, ekinodermoj, celenteruloj, koraloj, spongoj, poliketoj, tunikuloj kaj algoj.


Ne mankas akvarioj kaj arkeologiaj trovaĵoj. La faka biblioteko, kun tekstoj el la plej gravaj esplorinstitutoj hejmaj kaj eksterlandaj, estas populara inter la ŝatantoj, lernantoj kaj studentoj pri mara biologio. Inter la pli ol mil sciencaj volumoj, oni reliefigas la kolekton de "Ŝiptaglibro pri la sciencaj kampanjaj esploroj de la Princo Alberto I el Monako (1896-1945)", tiun de la ŝipo "Calypso" de la




Teoria skemo por stivado de amforoj



Maksimuma ŝipkapablo (S. GERVAIS 3), 45,6 tunoj = proksimume 400 / 500 amforoj




Rigardo asonometria



Rigardo transversa



Rigardo flanka



Rigardo el supre



komandanto Cousteau (1979-1995) kaj 3 novaj volumoj donacitaj de la Usona Defenda Departemento (eksterkomercaj) pri la venenaj fiŝoj en la mondo.


Interne de la Fiŝmuzeo, krom la paleontologia kolekto donacita de inĝ. Giangaspere Buriani en 1987, estas fosilioj, kiuj datiĝas el la mezozoiko al la kvaternaro, donacitaj de pluraj civitanoj.

Pro ilia kontribuo al la kresko de la Muzeo ekestis "itineraj" nomitaj laŭ la membroj fon-

dintoj: Umberto Patrizi, Emidio Agostini, Fausto Pallotini, Primo Gregori, Lorenzo Cavatassi, Ernesto Miritello, Pietro Rosetti, Sergio Giacoia, Albano Bugari; alia itinero estas nomita laŭ Antonio Lattanzi, donanto de kompleta malakologia kolekto, alia laŭ Pietro Marinangeli, pro la kolektado de la akvobirdoj kaj rabobirdoj, kaj la lasta itinero, nomata laŭ Franco Ramoscelli, devenanta el Forlì, aŭtodidakta enbalzamigisto kaj donacanto.



En 1965, kelkaj danĝeraj "marvipuroj" estis transdonitaj al prof. Capriotti, kiu trastudis ilin serĉante antidoton kontraŭ la mortiga veneno. Laŭ la plej novaj esploroj efektivitaj en la "World Life Reserches Institut" en Colton, Kalifornio, la veneno de tiuj idrofidoj estas pli venena ol tiu de kobro.



### **Muzeo pri la mara civilizacio de Markio "Maro por vivi, muzeo por revivi"**

Danke al la kontribuo de la Regiono Markio kaj al la Fondaĵo "Cassa di Risparmio di Ascoli Piceno" (Ŝparkaso), la Marmuzeo de Markio sin proponas al la admiro de la vizitanto en ĉiu sia riĉeco danke al la decida kontribuo, kiu venis de multaj civitanoj, kiuj donacis objektojn pri la mara vivo, kiujn ili konservis hejme dum jardekoj. La muzeaj itineroj estas organizitaj per

"rakontaj unuoj"; bazo de la ekspozicio estis reala esploro de historia karaktero, efektivigita sur gamo de fontoj (arkiva fonto, trovita materialo, bibliografia citaĵo, gazeta artikolo, altvalora "parola fonto"), kiuj povas redoni informojn kaj datumojn pri la mara pasinteco de San Benedetto kaj de ĝia regiono.

La Marmuzeo, fakte, inter siaj trajtoj, proponas ankaŭ serion da dokumentoj (identigitaj, retrovatataj, studataj kaj analizataj) alireblaj danke al presita aŭ plurmedia publikigo.

Specialaj historiaj sekcioj entenas dokumentojn pli aŭ malpli antikvajn, ankaŭ uzataj por la ekspozicio de aliaj rakontaj unuoj, kaj tial videblas: sonkonuso kun la malsamaj sonoj